



## **LA LUKTO DE LA PARTIZANINOJ EL RAKAHO**

**Antaŭnelonge(\*) la partizanoj liberigis la ĝisnunan ĉefurbon de la Islama Ŝtato en Sirio, kaj en la unua linio batalis, kunlaborante, kurde, arabaj kaj asiriaj inoj... Berria parolis kun kelkaj el ili en Rakaho.**

La urbon Rakaho, estinta ĉefurbo de la Islama Ŝtato en Sirio, oni ĵus liberigis; la 17-a de oktobro restos skribita en la historilibroj kaj gravurita en la memoro de la loĝantoj. Nun, ĝi estas la bildo de dum jaroj suferitaj bataloj kaj bombadoj: domruĵoj, detruaĵo ... La Islama Ŝtato, kune kun kelkaj ĝihadismaj grupoj, okupis la urbon printempe de 2013, kaj en 2014 nomumis ĝin ĉefurbo de la kalifejo. Antaŭ la milito la urbo havis ĉirkaŭ 220 000 loĝantojn. Sed nun, oni bezonas multmilionan investon, por ke la homoj povu denove vivi tie, ĉar ĝi estas tute detruita.

La araboj de Rakaho estis en la unua frontlinio, ankaŭ la virinoj. La IPT<sup>(1)</sup> kaj la ina fako de la SDF<sup>(2)</sup> batalis en la unua linio. Solidare, multaj arabaj, kurde kaj asiriaj virinoj alfrontis la plej gravan religie ekstremisman grupon de la mondo. Por multaj el ili ne estis facila afero aliĝi al la milico, ĉar ne ĉiam la familio konsentis. Tiel okazis, ekzemple, al Azadi. Tiun nomon ŝi alprenis en 2015, kiam ŝi forlasis sian hejmon kaj aliĝis al la IPT. En la kurda lingvo *azadi* signifas liberecon. "Mia familio ne volis; oni min timigis, por ke mi en aliĝu al milico". Ŝi naskiĝis en Dirbeso<sup>(3)</sup>, kaj kiam ŝi aĝis 19 jarojn, ŝi partoprenis en la operaco de Rakaho, batalante per ŝia BKS-mitralo. Iam ŝi estis vundita kaj pasis monaton en la hospitalo de Hesiĉo<sup>(4)</sup>. Kiam oni demandis la ŝi, ĉu la vundo lasis spurojn, ŝi respondis tiel: "Mi ne havas malfacilaĵojn. Kiam mi estas kun aliaj inoj, mi forgesas la doloron." Ŝi agnoskis, ke la plej dolora flanko de la milito estas la morto de kamarado, kaj aldonis: "Kiam kamarado martiriĝas, tio kolerigas nin, kaj ni batalas eĉ pli impete".

## Sepmonata batalo

Entute, la operaco por Rakaho dauris sep monatojn. Unue, oni devis liberigi, unu post la alian, la vilaĝojn situantajn en la siria ebenaĵo. Poste, en majo, oni kaptis la strategie gravan akvobaraĵon de *Tabqa*. Fine, oni atingis la urbon kaj batalis dum 135 tagoj kontraŭ malamiko, kiu havis multan tempon por pretigi la defendon en sia teritorio. Laŭ araba batalantino nomata Nisan, kiam la fortoj de la SDF atingis la pordojn de Rakaho, la IŜ estis pretiginta homŝildon el la civiluloj: “Kiam ni transiris la periferion de Rakaho, ni vidis, ke la IŜ estis stariginta barilon per la civiluloj restintaj en la urbo; pro tio, niaj fortoj, tien alveninte, ne povis pafi.” Laŭ informoj de la Siria Observejo pri Homaj Rajtoj(s), kun sidejo en Britio, estis 3250 mortintoj dum la batalo de Rakaho, el kiuj 1330 estis civiluloj. Plej certe ili mortis kaŭze de la bombadoj de la koalicio.

Interne, la urbo estas labirinto: kun profundaj longegaj tuneloj, subteraj hospitaloj, kaj ankaŭ centoj da minoj, kaŝitaj en nesuspektindaj lokoj: ekzemple, en skatolo da vermicelpakaĵoj. Foje, komandanto de la PPT deklaris: “En Rakaho ni havas 3000 malamikojn: 1000 IŜ-anojn kaj 2000 minojn.”

Arjin – tio estas ŝia batalnomo – aĝas 17 jarojn, kaj de tri monatoj ŝi membras en la IPT. Ŝi estas el Rakaho, kaj ŝi pasis kvar jarojn sub la IŜ. Ŝi memoras, ke oni ne povis eliri surstraten, ke oni ne povis viziti la lernejon. La IŜ forkaptis ŝian patron kaj postulis al la familio por ties liberigo 10 milionojn da siriaj liroj: ĉirkaŭ 2000 dolarojn. Do, li restis kaptito ĝis kiam la familio povis kolekti la monon. Arjin memoras, kiel ĉiuj ŝiaj najbaroj kuniĝis al la IŜ kun la intenco eviti kruelaĵojn kaj reprezaliojn, sed ŝi diris, ke ŝia familio ne volis: ili ne volis partopreni en tiu kruelaĵo. Kiel konsekvenco ili ne povis forlasi sian domon, kaj Arjin pensas, ke pro tio oni forkaptis ŝian patron. La najbaroj ĉiam diris al ili, ke estante araboj kaj muzulmanoj ili devas fariĝi membroj de la IŜ.

Nisan, batalantino de la SDF, ankaŭ partoprenis en la operaco de Rakaho, kaj ŝi memoras historiojn pri la merkatoj de sklavinoj: “La sistemo de la IŜ estis aĉeti kaj vendi virinojn. Ekzistis merkatoj de virinoj. Oni vendis jezidajn virinojn kaj ankaŭ kristanajn. Oni havis specialan bazaron por tio.” La prezo ne ĉiam samis, sed ĝi estis ĉirkaŭ 9000 siriaj liroj, tio estas la prezo de ŝafo. “Mi aliĝis al la operaco por la liberigo de Rakaho por batali favore al la rajtoj de la virinoj. Tie ĉi ne estis rajto por la virinoj. Ili estis nur sklavoj. Nenion ili povis diri; ili ne havis parolrajton. Mi venis por protekti la rajtojn de la inoj.”



## Liberigbatalo

Oni ordonis al la partizanino Azadi resti en Rakaho por starigi IPT-oficejon, kiu servu kiel milica rekrutigejo por la junulinoj de la regiono. Pasiĉe ŝi parolis pri la vivo en la IPT kaj la al ŝi taskita laboro. “Kiam la inoj vidas kiam laboron ni faras, kiam vivmanieron ni havas, ili ankaŭ volas aniĝi.” Azadi agnoskis, ke multaj aliĝantaj knabinoj alvenas forfuĝinte el la kruelaĵoj interne de ties familioj, sed, en aliaj kazoj la familioj mem alportas la filinojn, por ke ili vidu, kio estas la IPT kaj aniĝu.

Arjin volas lukti favore al la rajtoj de la arabaj virinoj. Ŝi agnoskis, ke la araba socio estas maljusta kun la virinoj. “En mia socio la ino estas sklavo: ne havas rajton. La viroj malice traktas ilin. Por la viroj, virino egalas ŝuparon.”

Arjin volas, ke ĉiuj arabaj virinoj aliĝu al la IPT, por lukti por siaj rajtoj, lerni la filozofion de la IPT kaj batali kontraŭ la patriarĥisma pensmaniero: “Por batali favore al la liberigo de la virinoj, ni devas koni nian socion; ni devas koni la viran pensmanieron, la pensmanieron de la IŜ. Ni devas scii, kial ili estas tiel kruelaj kun la virinoj. Tion sciante, ni povas ĝin alfronti kaj tiel liberigi la virinojn.”



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).
- (2) Siriaj Demokrataj Fortoj (SDF)/Hêzên Sûriya Demokratîk (HSD).
- (3) Dirbêsi.
- (4) Hesîçe.
- (5) Syrian Observatory for Human Rights, en la angla.

### KLARIGOJ:

Aŭtoro: Sara de Ceano-Vivas Nuñez.

(\*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 3-an de Novembro 2017-a.

Tradukis: NXC. Decembro 2018-a. Provlegis: DS.